



INTERNACIE
Preskaŭ 30 radistacioj
diskonigis Esperanton
en Hungarujo

SPORTO
Jen denove la
esperanta kuristo
Walter Fontes



InKo

N-ro 78
kke.org.br



KIEN VI IRAS SOLA?

Ĝis kiam nia
movado dependos
preskaŭ nur je
unuopaj personoj?



LOKE
Emilio Cid estas la
nova ĉefdelegito de
UEA en Brazilo

ESPERANTA VIVO
Esperantista
verkistino premiita
en Rio





6 KOVRILE
Ĝis kiam la E-movado dependos preskaŭ nur je unuopaj personoj?



10 SPORTO
Jen denove la Esperanta Kuristo Walter Fontes



5 E-VIVO
Esperantista verkistino premiita en Rio



8 INTERNACIE
Esperanto en la etero



9 KOMUNIKADO
Esperanto vidiĝas ĉe Rusuja televido

Rubrikoj

- 3** Vidpunkto
- 8** Internacie
- 11** Loke
- 13** Libro-ŝranko
- 14** Radaro

InKo



Eldono n-ro 78

Jan-Feb/2014

Kunordigado Givanildo Ramos Costa
Redaktado/Editorado Fabiano Henrique
Revizio Revizio-komisiono
Kunlaborantoj Jair Salles, G. Costa, Fabiano Henrique kaj Fernando Pita
Cirkulado dumonata

Kultura Kooperativo de Esperantistoj
Adreso Avenida Treze de Maio, 47 - sl. 208 - Centro - Rio de Janeiro (RJ)
BR 20031-921

Telefono 55 21 2220-7486 kaj/aŭ 55 21 2544-4314

Rete www.kke.org.br

Redakcio inko.kke@hotmail.com

El la Redakcio

Spite ĉiajn malfacilaĵojn alfrontitajn de ni dum la lasta dumonato, jen la nova numero de InKo! Ĝi elmontras nian amon al Esperanto kaj la respekton de KKE al la legantoj.

Tiu ĉi eldono eliras kun kelkaj grafikaj novigoj, kiuj celas igi nian gazeton pli bela, moderna kaj facilegebla. Krome la teksto-farado stebas liveri al la publiko materialon ne nur elegante redaktitan, sed ankaŭ malpezan, por igi la legadon plezuriga sperto.

La komentarioj senditaj de niaj legantoj estas des pli gravaj, ĉar el ili ni ĉerpos la necesajn informojn, por ke ni - eldonon post eldono - plibonigu nian laboron. Alia menciinda afero estas zorgo donita de ni al la virtuala versio. Ĉiuj ligiloj direktas la leganton al la responda retejo.

Tial ni deziras al vi bonan legadon!

Fabiano Henrique

Rimarko: Recenzotajn librojn aŭ aŭdvidaĵajn materialojn oni alsendu po du ekzempleroj al la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. La ricevo de tiaj korespondaĵoj tute ne devigas la institucion publikigi favorajn opiniojn pri ili.



Pensiga artikolo

Kiam mi legis la historian artikolon “Skandaloj, miskomprenoj kaj skismo”, verkitan de Jean Amouroux, publikigitan en la revuo *Esperanto* de Aprilo 2009, mi iom pli konkrete kaj serioze taksis la dolorigajn travivaĵojn alfrontitajn de la pioniroj de nia movado.

Tiu skribaĵo havas la jenajn subtemojn: “Zamenhof kaj la franca periodo de Esperanto”; “Antisemitismo, Dreyfus-skandalo kaj Louis de Beaufort”; “Tutmonda Ekspozicio, La Delegacio kaj Hachette”; “Zamenhof kaj la franca Ordeno”; “Kongreso en Bulonjo kaj la judeco de Zamenhof”; “Homaranismo”; “Pri lingvaj reformoj” kaj “La plej lasta fiasko: Parizo 1914”.

Iu ajn el tiuj subtemoj permesas al ni pli funde analizi la dolorojn travivitajn de la tiamaj esperantistoj, speciale Zamenhof.

“Ĉu oni ankoraŭ bezonas multe diskuti kaj teoriumi por definitive atesti, ke Zamenhof pravas?”

Malgraŭ la graveco de ĉiuj subtemoj, la de mi elektita estis “Homaranismo”, afero ne multe akceptita de la plimulto de la samideanoj. Tiun malbonan akcepton mi ne sukcesas kompreni. Cetere, mi mem spertis tian strangaĵon tie ĉi en KKE, kiam unu eŭropa esperantisto tre malbone reagis kontraŭ la Interna Ideo de la Internacia Lingvo. Li emfazis, ke Esperanto estas nur lingvo, kulturo, kaj ĝi devas roli en lia regiono tiamaniere.

Tia stulta sinteno *treege* ŝokis min, konsiderante, ke se Esperanto vivas ĝis nun, oni tion certe ŝuldas al la idealismo, serioze starigita de L. L. Zamenhof. Okaze de la 2a UK, en Genevo (Svisujo), li eĉ diris: “Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la Esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: ‘Esperanto estas nur lingvo; evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun ia ideo, ĉar alie oni pensos ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon!’ Ho kiaj vortoj!”

La Patro de Homaranismo, en tiu sama UK, bone reliefigis, ke “...venos iam la tempo, kiam

Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj Esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas.”

Do, trafe analizante la atentigon de Zamenhof faritan antaŭ preskaŭ du jarcentoj kaj mian movadan okazintaĵon, kiu tutcerte respeguliĝas ĉe pluraj nuntempaj movadoj, naskiĝis en mia menso la jena demando: ĉu ni bezonas plifirmigi la idealismon de Esperanto aŭ ne? Surbaze de tio do, Homaranismo, kiu estas sinonimo de Interna Ideo, estas tre bonvena.

Kiel ĉiu esperantisto scias, la bela Ideo de Zamenhof, nome Homaranismo, estis verkita pere de Dek Du Dogmoj. Kompreneble, por ne longigi ĉi tiun artikolon, el ili mi elektis nur du, kiuj multe pensigas nin kaj pravigas lian kreaĵon, ankoraŭ ne multe komprenatan de la plimulto de la esperantistoj. Jen la Unua Dogmo: “Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj; ĉiajn idealojn kaj celadon gente-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoisman kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo”. Ĉu la Pola Amiko pravas aŭ ne? Ni bone rigardu la nuntempajn interrilatojn de la popoloj! Fine ni citas la Duan Dogmon: “Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj, sed ne laŭ lia deveno. Ĉian ofendadon aŭ persekutadon de homo pro tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia lingvo aŭ religio ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.”

Ĉu oni ankoraŭ bezonas multe diskuti kaj teoriumi por definitive atesti, ke Zamenhof pravas? Do, mi povas facile veni al la konkludo, ke sen homarana sinteno ni—ne nur esperantistoj—neniam progresos. ★

Mi estas esperantisto el Indonezio kaj ankaŭ estas internacia magistra studento en Tajvano. Antaŭ ĉirkaŭ ses monatoj mi eklernis Esperanton, kaj mi tre amas ĝin.

Kiam mi serĉis bultenojn kaj Esperantajn asociojn el la tuta mondo, mi trovis la revuon *InKo*. Ĉio en ĝi estas interesa.

Mi volas scii ĉu mi eble povus kontribui kun artikoloj al via gazeto.

*Teddy Nee
Tajvano*

Estu bonvena por alsendi tekstojn verkitajn de vi. Ni volonte publikigos ilin laŭeble. Koran dankon!

Redakcio de InKo

Kvankam mi nur estas lernanto, mi tradukis manlibron por tradukistoj, nomatan *Esperantilo* kaj *EsperantiloTM*. TM signifas *tradukaj memoroj*.

Mi sendos kopion, se necese. Vi povas doni ĝin senpage al iu tradukisto.

Aliajn programojn mi uzas por konsulti terminojn, nome *XBench*, kun vortoj en Esperanto, kolektitaj de mi tra la jaroj.

*Nubio Nunes Revoredo
Nova Iguaçu - Brazilo*

Dankon pro la donaco de la bela lasta numero. Mi volas provi respondi la demandojn, kiujn vi starigis en la enkonduko al la n-ro 76:

1) *Kiu estas la celo de la Esperanta gazetaro?*

Verŝajne la celo estas informi la esperantistojn pri aferoj gravaj rilate al Esperanto kaj instigi ilin daŭre resti en la komunumo kaj agi favore al la lingvo. Atentu, tio ne estas la celo de ĉiuj gazetoj. Kelkaj ekzistas nur por prezenti la vidpunktojn de difinita estraro aŭ de difinita grupo. Kelkaj ekzistas nur por montri la literaturan valoron de difinitaj aŭtoroj. Tamen ekzistas ankaŭ gazetoj kiel *InKo*, kiuj havas la ĝeneralajn celojn, kiujn mi montris en la komenco. Kaj tio estas io bona.

2) *Ĉu la Esperanto-mondo ankoraŭ centriĝas en Eŭropo?*

Malpli kaj malpli, sed ne temas nur pri la Esperanto-movado. Temas pri ĉio. Mi ĉiam diris, ke la efektiva problemo de Esperanto en la dua duono de la pasinta jarcento estis la manko de tre forta movado

en Usono. Malgraŭ tio, ke oni povas malŝati tion, la monda imperio en tiu periodo havis sian centron en Usono. Se usona ĵurnalo diris ion pri Esperanto, tio estis represata en la tuta mondo. Se itala gazeto diris ion favoran pri Esperanto, tio estis reprenita eĉ ne en Italujo mem. Sed Esperanto en tiu tuta periodo restis centrata ĉefe en Eŭropo kaj esperis, ke la miraklo venos el Bruselo. Sed neniu miraklo povis veni el Bruselo, ĉar Bruselo rigardis al Vaŝingtono por kompreni, ĉu de tie venas signaloj.

Nuntempe la mondo estas ŝanĝiĝanta ankaŭ se eŭropanoj ne volas kompreni tion. Oni ankoraŭ parolas pri konkurenco, kvazaŭ eŭropaj firmoj povus konkurenci kontraŭ la ĉinaj firmoj. Oni laŭgrade devos adaptiĝi al la realo, ke Ĉinujo, Brazilo, Barato, Rusujo kaj aliaj landoj de la sudo de la mondo laŭgrade iĝos pli gravaj, pli riĉaj, pli memdecidaj.

Ni en Eŭropo dum multa tempo devos lerni kiel mastrumi agoniojn. Do, pro la forto de la eksteresperanta mondo ankaŭ esperantistoj devos cedi al la ĝenerala proceso de ekstereŭropiigo.

3) *Ĉu eŭropaj esperantistoj rigardas la Internacian Lingvon kiel privatan aferon, kaj tia sinteno infektas iliajn publikigaĵojn kaj pensmanierojn?*

Jes. Sufiĉas legi grandajn vortarojn por kompreni ke la baza principo de eŭropaj esperantistoj estis dum jarcento: tio kio estas franca aŭ angla aŭ almenaŭ germana estas ankaŭ parto de Esperanto. Ankoraŭ nun la Akademio de Esperanto kapablas debati dum monatoj pri la uzo aŭ neuzo de difinita radiko, ekzemple: *kirurgi-*, kaj ne sentas la bezonon scii, kiel oni diras tion en la ĉina, en la japana, en la araba, ktp. Espereble nun finfine Espernato iĝos vere tutmonda lingvo.

4) *Ĉu ni – alikontinentaj samideanoj – estas nur periferiaj esperantistoj?*

Vi estis, sed vi ne plu estas. Rigardu la agadon de brazilaj esperantistoj, rigardu iliajn revuojn, kaj komparu ilin kun la eŭropaj. Vi estas pli kaj pli en la centro.

*Renato Corsetti
Palestrina - Italujo*

Tre riĉa materialo estas prezentita en la revuo *InKo*. Dum tuta horo mi legis novaĵojn pri stato de Esperanto en la mondo. Denove motoras S-ro Fabiano Henrique. Dankon pro ĉio!

*Jurij Kivaev
Respubliko Marij El - Rusujo*

Esperantista verkistino premiita en Rio

Esperanto ludas gravan rolon en la historia fono de la honorita libro

Fabiano Henrique

La retejo *Ponto do Autor* (laŭlitere: Ejo de la Verkistoj) aljuĝis la premion *Codex de Ouro 2013* al la brazila esperantista verkistino Renata Ventura. La honoraĵon ŝi ricevis je la 7-a de Decembro en Rio-de-Janeiro, pro sia libro *A Arma Escarlate* (La

ruĝa armilo). Ĝi estis premiita en la kategorio Supernatura/horora Romano.

Tiu verko estis publikigita de la eldonejo Novo Século, en la jaro 2011-a. Temas pri fantazia romano, kiu rakontas la historion de la knabo Hugo Escarlate, loĝanto de la malriĉa komunumo

Santa Marta, en la suda regiono de Rio. Li fariĝis sorĉisto kaj serĉis lernejon por tiaj homoj en la monto Korkovado. Poste li provis uzi magion por venĝi al siaj familianoj la minacojn fari-tajn de lokaj krimuloj.

En la libro *A Arma Escarlate* Esperanto ludas gravan rolon. La sorĉoj kaj magiaĵoj estas instruitaj kaj parolitaj en la Internacia Lingvo por havi kvazaŭ "tutmondan amplekson".

Renata Ventura substrekis la gravecon de tiu idiomo por la historio, okaze de intervjuo donita de ŝi al Radio Rio de Janeiro. Ŝi diris, ke post la legado multaj junuloj ekkonis Esperanton kaj de tiam interesiĝis pri ĝi.

La unua eltiraĵo tute elĉerpiĝis. Kelkaj recenzistoj komparas la libron verkitan de Ventura al la historioj de Harry Potter. ★



Renata Ventura dum la ceremonio kaj la honoraĵo ricevita de ŝi. (Fotoj: Ponto do Autor)



KIEN VI IRAS SOLA?

**Ĝis kiam nia movado
dependos preskaŭ nur je
unuopaj personoj?**

Fabiano Henrique

Kiom da bonaj kaj frukto-
donaj iniciatoj aŭ insti-
tucioj, kiuj agadas
favore al Esperanto,

ne postvivas siajn
kreintojn? Certe
la historio de nia
movado havas aron da
okulfrapaj ekzemploj, kiuj
certe pensigus ĉiun
atentan esperantiston.
Tamen strange tiu
sama situacio ŝajne ripe-
tiĝas tra la tempo kaj spaco,
malprofite por nia afero. Kial?

Kio okazos, por ekzemplo, al
kelkaj eldonejoj, kluboj aŭ aliaj societoj
kiam iliaj iniciatoroj forpasos? Ĉu tiuj
homoj preparas posteulojn? Tiu
demando estas des pli grava,
malgraŭ ties ŝajna trivialeco, ĉar
morto estas la nura certeco en la
vivo. Do, ĝis kia grado la malapero
de iaj gravaj Esperantaj instancoj
senteble malutilos nian movadon?

Ĉiam kaj ĉie oni parolas pri la gra-

veco estigi strategiajn iniciatojn. Jes ja!
Neniu malkonsentas; tiu graveco estas evi-
denta. Tamen la gvidantoj de nia movado
urĝe bezonas ĉesi vane teoriumadi. Ili tuj
eniru la praktikan kampon.

Alivorte, planoj kaj strategioj devas tuŝi kaj
ampleksi la ĉiutagan vivon de nia movado.
Male niaj gazetoj plu informos pri la malape-
ro de institucioj, kiuj grave kontribuis por la
antaŭenigo de Esperanto.

Konkreta kazo

Eĉ Kultura Kooperativo de Esperantistoj
travivis similan situacion. Meze de la 1980a
jardeko, la forpaso de ties prezidanto kaj
kunfondinto, nome Braz Cosenza, kondukis
tiun institucion en danĝeran vojon. Feliĉe
ĝiaj plej fervoraj anoj kuniĝis por savi ĝin.

Sed KKE ne eliris el tiu ŝtormego sen-
vunde. Ĝi perdis sian presejon, kaj estis devigita
pagi altegajn ŝuldojn al la eksaj dungitoj.

Nur post ĉirkaŭ 30
jaroj oni restarigis
ĝian eldonan fakon.

Ĉu oni povas mezuri la
malprofiton por la Esperanta
afero, kiun kaŭzas la senmovo de
simila movada instanco?

Certe ĝi estas nekalkulebla.

Ebla solvo

Unu el la kialoj de tiu proble-
mo estas sendube la manko de
unuigo ene de la Esperanto-
movado. Se oni, anstataŭ disuti,
serioze pripensus iniciatojn por
la plibonigo de nia agado, certe
nia afero estus pli konata kaj
respektata de la publiko. Pri tio
iam diris Zamenhof: "ni ĉiuj
devas antaŭ ĉio labori en
plej severa unueco, por ke
ni akiru por nia afero la
konfidon de la mondo."



Tiu eldiraĵo ne estas vana kaj eksmoda. Ĝi enhavas instruojn, kiuj devus esti serioze konsiderataj de ĉiu samideano. Se tiel estus, nia movado estus atinginta pli altan stadion.

Alia ebla kialo por tiu riska situacio estas ĵaluzo. Kiam oni nur "rigardas sian propran umbilikon" kaj ne atentis al alies iniciatoj, aŭ

tro zorgeme malpermesas, ke iu alproksimiĝu por kunlabori, tiu restas izolita kaj falas en sian propran kaptilon.

Do urĝas, ke oni nepre forlasu vantecon kaj individuismon, kaj malfermu sian menson al la mondo en pozitiva sinteno. Nur tiel nia movado progresos. ★

La artisto, kiu bele ilustris la kovrilon de tiu ĉi numero de *InKo* nomiĝas Renaud Hetmanek (foto). Li estas multprofesia homo, laboranta sammajstre kiel artisto, inĝeniero, instruisto kaj radioparolisto.

Krome li redaktas kaj prezentas la programon *Arte em exposição* (Arto ekspozicie), elsendata ĉiusemajne de Radio Rio de Janeiro.

Esperanto-kampe li regule kunlaboras kun la redakcio de la programo *Esperanto, la Lingvo de Frateco*, de tiu sama radiostacio, kaj kunordigas la Esperantan Grupon Ilha do Governador, en la norda regiono de Rio.

Renaud Hetmanek subtenas virtualan esperantan ekspozicion, kiu alireblas ĉe la interreta adreso www.arte.renaud.nom.br.



En la etero

Preskaŭ tridek radiostacioj diskonis la Internacian Lingvon en Hungarujo

Fabiano Henrique

Radio-reklamo pri Esperanto estis elsendita pli ol mil fojoj, dum la unua duono de Februaro. Tiun 11-sekundan propagandajon disradiis 26 radiostacioj en Hungarujo.

Laŭ la informretejo Ret-Info,

entute estis pli ol tri horoj da disaŭdigoj. La kampanjon mendis la Esperanto-centro Eventoj, por diskonigo pere de stacioj situantaj en la hungara internlando.

La reklamo ne nur prezentas Esperanton kiel elekteblan

lernobjeton por lingvaj kaj abiturientaj ekzamenoj, sed ankaŭ diskonigas perinterretan kurson de tiu idiomo.

Simila iniciato estas pionira en Hungarujo. Oni ankoraŭ ne scias pri simila entrepreno en aliaj landoj. ★



Radiostacioj, kiuj disaŭdigis la E-reklamon. (Foto: Ret-Info)



La nova fonduso de TEJO

Komence de Februaro TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) estigis la fonduson Trampolino. Ĝi celas monhelpi projektojn por antaŭenigi Esperanton inter junuloj. Demandojn oni sendu al la retadreso hr@tejo.org.

Programo-riĉa aranĝo en Kubo


Kuba Esperanto-Asocio organizas la duan internacian Esperantan renkontiĝon nomatan *KERo 2014*. Tiu aranĝo okazos de la 12a ĝis la 16a de Marto, en la kampadejo *Dos Hermanas* (Du Fratinoj), situanta en la valo Viñales.

Laŭ la organizantoj la programo estas riĉa. Estiĝos kursoj,

seminarioj, ekzamenoj kaj ekskursoj. Ankaŭ okazos artaj prezentadoj, filmprojekcioj kaj sportaj aktivaĵoj.

Dum la aranĝo efektiviĝos la kunsido de la komitato de Kuba Esperanto-Asocio.

Krome ĉiutage oni faros amatorajn radio-elsendojn.



Eĉ amatorajn radioelsendojn oni planas por tiu evento

O adeus a um fervoroso esperantista

Foto: Aloísio Sartorato

Faleceu no dia três de fevereiro o esperantista Jorge Campos de Oliveira, de 92 anos. O passamento ocorreu às 3h00, no Hospital da Ordem Terceira da Penitência, localizado na Tijuca, na Zona Norte do Rio. Fontes ligadas à família dão conta de que a *causa-mortis* foi parada respiratória.

Jorge Campos de Oliveira era coronel reformado da Polícia Militar do Estado do Rio de Janeiro. Teve atuação constante durante décadas no movimento

esperantista brasileiro. Além de ter participado no antigo *Brazilia Klubo de Esperanto*, era membro da Associação Esperantista do Rio de Janeiro, a cujas reuniões frequentemente comparecia, até o final da vida.

Nas décadas de 50 e 60, apresentou programas sobre o idioma na Rádio Roquette Pinto. Desde 2003 era sócio da Cooperativa Cultural dos Esperantistas. Em 2007, foi homenageado com uma placa, por ocasião do solenidade de abertura do 42º Congresso Brasileiro de Esperanto, na capital fluminense.



**Jorge Campos de Oliveira:
um fervoroso esperantista**

O sepultamento aconteceu no mesmo dia, no Cemitério do Caju, na Zona Portuária. ★

Esperanto nas bibliotecas

A Biblioteca Municipal João Palma da Silva, em Canoas (RS) recebeu livros da Cooperativa Cultural dos Esperantistas. Enviou-se um pacote contendo dez obras em esperanto e português.

Desde julho de 2001, a instituição doou mais de 1200 livros a 112 entidades brasileiras e 12 estrangeiras.

A iniciativa faz parte da campanha *O Esperanto nas Bibliotecas*, iniciada por Aloísio Sartorato, atualmente coordenada por Carlos Alberto Gomes da Silva.



Música

A cantora Elma Flora lançou o CD *Mi kantas Esperante*. O disco contém sete faixas, entre composições autorais e versões. Os ritmos são variados, indo do samba à música romântica.

O ponto alto é a faixa *Fantazio*, tradução da clássica *Fascinação*, eternizada nas vozes de Carlos Galhardo e Elis Regina.

Outro destaque é *Memoraĵoj el Ipakarai'*, possivelmente a primeira gravação de uma guarânia na Língua Internacional neutra.



InKo Brasil

Cooperativa Cultural dos Esperantistas
Avenida Treze de maio,47 - sobreloja 208
Centro - Rio de Janeiro/RJ - (21) 2220-7486



Como entender melhor o “subjuntivo” em esperanto

A GRAMÁTICA UNIVERSAL DO ESPERANTO

Nota-se que, em todas as línguas, ocorre um fenômeno curioso com as crianças. Em nossa língua, por exemplo, a criança que está começando a falar pode dizer: "eu comi"; "eu bebi"; e... "eu fazi"... Infelizmente, os pais são obrigados a corrigir logo a criança, dizendo que o "certo" seria "eu fiz"... É pena que muitos nem notem, nesse fenômeno linguístico, um traço muito importante da psique humana. Ou seja: dizendo "eu fazi", a criança mostrou que ela, mesmo "inconscientemente", estaria obedecendo a um paradigma de conjugação verbal, misteriosamente programado na sua tão tenra mente. Depois, vão se estabelecendo outros "milagres linguísticos", como, por exemplo, o fato de a criança assimilar o tão abstrato conceito do "s" do plural, bem como a desinência "a" para marcar o feminino... Provavelmente Zamenhof só ousou lançar a sua "língua planejada" porque esse planejamento estaria alicerçado nessa profunda plataforma milenar do "inconsciente coletivo" da humanidade. Isso significa que ele teria descoberto (ou "redescoberto") uma espécie de "gramática universal" da Língua Humana... O fato decisivo é que o Esperanto... "funciona"... – como disse o grande linguista francês Antoine Meillet. E o Esperanto funciona em todas as culturas – tanto no ocidente, como no supostamente exótico oriente... É verdade que os orientais podem dominar bem as línguas ocidentais – e vice-versa. Isso deve mostrar que, no fundo, a psique humana é essencialmente equivalente. O "milagre" é que uma língua "artificial", como o Esperanto, também se beneficia dessa similitude profunda da "habilidade linguística universal". E é aí que imaginamos estar, inclusive, uma boa base para entendermos melhor o tema proposto no título deste modesto artigo

– que só faz ecoar grandes ideias, já veiculadas pelos nossos grandes linguistas-esperantólogos, como Privat, Waringhien, Kalocsay, Piron e vários outros, inclusive do oriente... Nesse rol, podemos incluir também a "prata da casa", como os nossos pioneiros Ismael Gomes Braga, Francisco Valdomiro Lorenz, Porto Carrero e vários outros. Note-se, aliás, que eles teriam estudado o Esperanto através do Francês – ou alguma outra das "grandes línguas" (como Alemão, Russo ou Inglês), que foram as principais línguas do famoso e corajoso "Unua Libro" (depois, parte do "Fundamento"), com que Zamenhof lançou seu projeto ao mundo. Mas... vejamos logo o que todo este preâmbulo (talvez exagerado) teria a ver com uma compreensão mais "facilitada" do uso do chamado "Subjuntivo" em Esperanto. É o que veremos no próximo item.

O "SUBJUNTIVO" NO ESPERANTO

Aliás, como se sabe, o Esperanto nem teria algum "Subjuntivo" – pois ele *não* criou "terminações" especiais para indicar essas formas que, em Português, por exemplo, podem ser as seguintes: – Presente do Subjuntivo (ex.: que eu *ame*); Futuro do Subjuntivo (ex.: quando eu *amar*); e Imperfeito do Subjuntivo (ex.: se eu *amasse*). Vamos revelar, agora, qual é o "artifício didático" (ou "macete") que sugerimos para *facilitar* ao máximo a compreensão das formas do Esperanto "equivalentes" às nossas "formas do Subjuntivo", acima citadas. O "artifício" (ou "macete") consiste apenas no fato de que, damos, primeiro, a "tradução oficial" dessas formas correspondentes ao nosso Subjuntivo; e, em seguida, damos a *esclarecedora* "tradução literal". É isso que fazemos em nossos livros didáticos,

inclusive desde o mais elementar, ou seja, o "Minicurso de Esperanto" (Curso Introdutivo; 5ª lição). Isso é reapresentado no segundo livro da série, ou seja, "Esperanto Conversacional" (Curso Básico); e até no "Suplemento Gramatical" do terceiro e último, ou seja, "La Konversacia Klubo" (Curso de Aperfeiçoamento). Como se vê, achamos que repetir não é supérfluo –pois, aliás, a repetição seria a própria alma do bom aprendizado. Vejamos, então, no próximo e último bloco deste artigo, a reprodução do item intitulado "Subjuntivo", extraído do "Minicurso" (e dos demais da nossa série). Note-se, em especial, a abreviatura "Lit." (= Literalmente), a qual serve, obviamente, para indicar a *elucidativa* "tradução literal" dos exemplos em causa. Mas também é de grande valor saber que o termo "Subjuntivo" é *sinônimo* do termo "Conjuntivo" (como, inclusive, indica o famoso dicionário "Aurélio") – ou seja: trata-se de uma forma verbal *introduzida* por meio de "conjunções", como: "que", "quando" e "se". Vamos, então, à prometida reapresentação desse item gramatical dos nossos livros didáticos – em nosso próximo e último bloco.

SUBJUNTIVO

Em Esperanto *não* há terminações especiais para o Subjuntivo. Assim, para expressar o nosso "Presente do Subjuntivo", usa-se o "Imperativo" (terminação "U"), precedido da conjunção "KE" (= que). Ex.: "Karlo volas *ke* mi *studu*" – Carlos quer *que* eu *estude*. Para expressar o nosso "Futuro do Subjuntivo", usa-se o próprio "Futuro Simples" (terminação "OS"), precedido de uma conjunção adequada, como "SE" (= se) ou "KIAM" (= quando). Ex.: "Se mi *volos*, mi *iros*" – *Se eu quiser*, eu irei (Lit.: Se eu "quererei", eu irei); – "*Kiam* mi *stu-*

dos, mi lernos" – *Quando eu estudar*, eu aprenderei (Lit.: Quando eu "estudarei", eu aprenderei). Finalmente, para expressar o nosso "Imperfeito do Subjuntivo", usa-se o "Condicional" (terminação "US"), precedido de uma conjunção adequada, como "SE" (= se). Ex.: "Se mi *povus*, mi *studus*" – *Se eu pudesse*, eu estudaria (Lit.: Se eu "poderia", eu estudaria).

Obs. – Note-se que demos poucos exemplos dessas formas do "Subjuntivo", acima – pois, tanto aqui, como nos livros didáticos, o espaço disponível para as regras gramaticais não podem nem devem ser muito longos. Assim, para *consolidar* o aprendizado de quaisquer pontos gramaticais, como estes, é preciso *ler mais frases* em que tais construções verbais ocorram, o que pode acontecer, principalmente, no livro "extra" da nossa série, intitulado "La Reveno" (Livro de Leitura Avançada). Mas, hoje em dia, dispomos de muita leitura, útil e abundante, na grande aliada do Esperanto, que é a Internet. Nela, você poderá ver, principalmente, os bons artigos, em Esperanto, desta nossa pequena-grande revista "Inko", bem como a interessante e mais ágil revista virtual, correlata, intitulada "Esperanto Ilustrita" (que basta "buscar" na Internet). Então, boas leituras! ★

Se quiser saber mais, veja temas correlatos, no "Suplemento Gramatical" do livro "La Konversacia Klubo" (Curso de Aperfeiçoamento), como os seguintes: "Citação indireta" (pág. 70); e "Uso lógico das formas verbais" (pág. 71). Para adquirir os livros citados, informe-se na página da nossa Cooperativa Cultural dos Esperantistas, em www.kke.org.br.

MUZIKO
MUZIKO
MUZIKO



www.kke.org.br
esperanto.kke@gmail.com

NOVA EPOKO EN LA ESPERANTA KOMUNIKADO

Komunikila konverĝo estas kunigi en unu solan retejon la plej aktualan esperantistan informilon, muzikon, recenzojn, filmojn, prelegojn kaj multe pli.

Esperanto Ilustrita

Virtuala Esperanto-revuo



www.esperantoilustrita.blogspot.com

Esperanto vidiĝas ĉe Rusuja televido

Henriĥ

Malgraŭ iom da misaj informoj, rusa TV malfermis spacon por la Internacia Lingvo

Foto: reprod.



La eksa ministro Miĥail Ŝvidkoj dum la programo-elsendo.

Je la unua dumonato de tiu ĉi jaro Esperanto aperis dufoje en la rusa televido. La 29an de Januaro, la ŝtata TV-stacio *Kultura* elsendis la programon *Kultura Revolucio*, pri la temo *Ĉu la lingva diverseco kondukis la homaron en dilemon?*

Dum la debato, kunordigita de la eksministro de kulturo Miĥail Ŝvidkoj, la Internacia Lingvo estis traktita tro supraĵe kaj iom antaŭjuĝe. Unu parto-

preninto eĉ diris, ke Esperanto estas "mortnaskita projekto, ĉar lingvo ne povas ekzisti sen historio". Laŭ la tiea esperantisto Nikolao Gudskov, tiu debato "bone montras la ĝeneralan rilaton al Esperanto de la averaĝa 'intelektula' komunumo" en Rusujo.

La 17an de Februaro, loka TV-kanalo en Noginsk disvidigis la programon *Novosti+*, dum kiu aperis kvin-minuta raporto pri Esperanto. Tiam oni intervjuis la esperantiston Viktoro Aroloviĉ. ★

Vegetaranaj esperantistoj kongresos

Inter la 17a kaj la 18a de Julio okazos la 1a Kongreso de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA). Tiu aranĝo estiĝos en la urbo

Nitra, okcidenta regiono de Slovakujo, samtempe al la Somera Esperanto-Studado (SES).

Laŭ la retejo de TEVA, tiu evento celas doni al ties membroj la eblon interkonatiĝi unuj la aliajn. Krome ĝi ebligas al ili lerni kaj instrui.

Ĉar en tiu sama loko estos centoj da esperantistoj, kiuj partoprenos unu aŭ ambaŭ aranĝojn, TEVA uzos la okazon por diskonigi kaj pridiskuti sian doktrinon. Tio ebligas al ĝi varbi novajn membrojn.



Elfoj kaj esperantistoj dum la kongreso de SAT

La 87a kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazos de la 9a ĝis la 16a de Aŭgusto en Dinan (Francujo). La temo de tiu aranĝo estos *Civitanoj loke agadas por konstrui ontcon*. Laŭ la retejo de SAT jam aliĝis 60 homoj. La institucio, tamen, celas venigi inter 150 kaj 200 kongresanojn.



Jen denove la esperanta kuristo

Iom post iom Walter Fontes
enskribas sian nomon en la
historion de Esperanto

Santos de Miranda

La brazila atleto Walter Fontes diskonigis Esperanton dum unu plia sporta evento. La 20an de Januaro li partoprenis en la Corrida de São Sebastião 2014 (Kunkuro de Sankta Sebastiano 2014). La aranĝo okazis en Aterro do Flamengo, en la suda regiono de Rio-de-Janeiro.

Fontes kunkuris je la dek-kilometra kategorio. Kvankam antaŭ nelonge li estis trafita de muskolaj problemoj, li kompletigis la voĵinon en 01:09:44.

Walter Rosa Fontes kuris surportante ĉemizon, sur kiu enskribiĝis la vorto Esperanto. Jam de pli ol jardeko, li partoprenas la ĉefajn stratkunkurojn en Brazilo, disvastigante la Internacian Lingvon. Iom post iom li plifirmigas sian nomon inter la plej elstarajn ĉiamajn esperantistajn atletojn.

La Kunkuro de Sankta Sebastiano estas la plej tradicia sporta evento en Rio. Ĝi enlistiĝas en ties oficiala kalendaro. Ĉiujare ĝi efektiviĝas je la 20a de Januaro, omaĝe al la patrono de la tielnomata *Mirinda Urbo*.

Aliaj partoprenoj

Je la 16a de Decembro, Walter Fontes partoprenis la 2-an Kunkuron de Komerlistoj, okazintan en la urbo Niterói (Metropola Regiono de Rio). La kuradvojo etendiĝis laŭlonge de 7 km. Fontes kompletigis ĝin en 00:35:29. ★

Walter Fontes dum la Kunkuro de Sankta Sebastiano, fine de Januaro. (Foto: diskonigado)

NOVA, NOVA, NOVA, la novaĵo estas NOVA!

Jen la plej agrabla maniero
festi la novjaron: sub la varma
suno de la brazila somero!

Fotoj: Allan Argolo



Allan Argolo

Jen la plej agrabla maniero festi la novjaron: sub la varma suno de la brazila somero! Tia estis la 5-a NOVA, la Novjara Arango de BEJO, okazinta de la 2-a ĝis la 5-a de Januaro en la montara urbo Petropolis, ĉirkaŭ 70 km for de la marborda Rio-de-Ĵanejro. La aranĝejo estis malnova bieno kiu iĝis junulara gastejo kaj kie ankaŭ sidejas neregistara primedia organizo. Jam firmiĝinta en la brazila kaj internacia e-kalendaro, la evento estas tute neformala kaj celas al amuziĝo kaj kunfratiĝo de junaj (ĉu aĝe, ĉu anime) esperantistoj. El spontanea etoso, naskiĝis la programo kiu enkalkulis aventuran promenadon tra la Nacia Parko Serra dos Órgãos, kie ni baniĝis en belaj akvofaletoj, kaj piediran turismadon tra la historia urbocentro, kie ni vizitis interalie la imperiestran muzeon, la domon de Santos Dumont kaj la Katedralon São Pedro de Alcântara.

Ankoraŭ pri la programo, ne forgesi la varia ludado, la sencelaj sed ne senprofitaj babiladoj, la sunumadoj kaj la freŝigaj banadoj ĉe la naĝbaseno. Krome, elstariĝis la drinkejo, unuafoje starigita en NOVA uzante la monunon Steilo, danke al laboro de Alexandre Raumont (Alekĉjo), kaj kandeloj donis intimecan trajton al la improvizita sed belega piano-koncerto de Guillaume Armide (elparolu *Gijom*!). Tiel la 15 partoprenantoj el Brazilo, Ĉilio kaj Francujo festis la novan jaron kaj eĉ ne subita kaj forta 10-minuta pluvego, kiu trafis nin preskaŭ senŝirmaj, makulis la amuziĝadon! Ni, do, deziras al vi, kiu legas tiun ĉi raporton, ke 2014 estu profitdona kaj amuzoplena!

* Rim.: La titolo de la raporto estas la oficiala himno de NOVA, rezulto de granda kreemo kaj longa cerbumado...

Iom pli vigla BKE

Fabiano Henrique

Iom post iom brazilaj kongresoj de Esperanto reprenas sian antaŭan vigelecon

Inter la 24a kaj la 28a de Januaro okazis en Florianópolis la 49a Brazila Kongreso de Esperanto (BKE). Aliĝis al ĝi proksimume 250 personoj.

Matene de la dua tago, LBV okazigis prelegon, kies temo estis “Ekumenismo estas universala deziro vivi Pace”. Ĝin prezentis Felipe Duarte. Samtage la hungara instruistino Petra Smideliuz donis lecionon de Esperanto kaj faris prelegon. La restarigo de la eldona fako de KKE estis la temo de la prelego, kiun Givanildo Costa faris je la sekva tago. Dum ĝi

lanĉigis la libro *Saluton, samideano*, verkita de la advokato Aloísio Sartorato.

Aro da kongresanoj okazigis surstratan informadon pri la Internacia Lingvo. Miloj da propagandfolioj estis disdonitaj al la piedirantoj.

Radio Rio de Janeiro elsendis la programon *Esperanto, la Lingvo de Frateco* rekte el la kongresejo. Krome, lokaj gazetoj kaj TV-stacioj faris raportojn pri la aranĝo.

Iom post iom brazilaj kongresoj de Esperanto ŝajne reprenas la vigelecon havatan antaŭ la diskutebla monato-ŝanĝo de la kongreso (de Julio per Januaro) entreprenita de la estraro de Brazila Esperanto-Ligo.



Nova ĉefdelegito

Emilio Cid estas la nova ĉefdelegito de UEA en Brazilo. Li anstataŭas la instruiston James Rezende Piton, kiu okupis tiun postenon dum dek jaroj. Piton sendis dankmesaĝon al la brazilaj esperantista komunumo. La teksto reliefigas la kvalitojn de Cid kaj deziras sukceson al li.

Je la 28a kaj 29a de Januaro 2014 okazis en la urbo Florianópolis la 7a Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj, kies temo estis *La Disvastigado de Esperanto en la Spiritisma Medio*.

Inter la prelegintoj estis elstaraj samideanoj, kiel Affonso Soares. La radioparolisto Givanildo Costa kaj la kuracisto Elmir dos Santos Lima ankaŭ paroladis.

La aranĝon organizis Brazila Asocio de Esperantistaj Spiritistoj, subtenate de Brazila Spiritisma Federacio kaj Spiritisma Federacio de ŝtato Sankta Katarino.

Spiritisma

Esperanto-renkontiĝo

Lecionoj de Esperanto por surduloj en Braziljo

Malfermiĝis la aliĝperiodo por la Esperanto-kurso efektivigota en la sidejo de Asocio de Gepatroj kaj Amikoj de Aŭdhandikapuloj de la Federacia Distrikto (APADA/DF).

La lecionoj estos senpagaj kaj celas homojn, kiuj havas ajnan nivelon de surdeco. Ilin donos la instruisto Edvaldo Junior.

APADA/DF malfermos du baznivelajn klasojn. Matene, la lecionoj okazos ĉiujŝaŭde, je la 10h20, ekde la 13a de Marto. Posttagmeze, ili efektiviĝos ĉiumerkrede, je la 16h20, ekde la 12a tago de tiu sama monato.

APADA/DF situas ĉe la adreso SDS (CONIC) - Edifício Venâncio Jr. Bloco M – Cobertura – Braziljo. Aliĝoj kaj informoj ĉe la retpoŝta adreso apada@apadadf.org.br.





iu lernejo scias parkere, ke Machado de Assis estas la plej grava verkisto el la tuta brazila literaturo. Li estis detalema observanto de la socia vivo de Rio dum la dua duono de la 19-a jarcento, kaj lia plumo prezervis por ni akurategan bildon de ties socio, koloritan de subtila humoro miksitaj al delikattona ruzeco.

Sekreta kaŭzo malkovrita de kuraĝa duopo

Fernando Pita

Estas do strange percepti ke, malgraŭ tio, malmulte da liaj tekstoj estis tradukitaj nialingven; afero pli suspektinda ĉar lia stilo estas nek *rokambola* nek barokema; fakte ĉiuj kapablas facile legi lin. Nur kiam *La sekreta kaŭzo kaj aliaj rakontoj* estis legita de mi, mi povis ekkapti la kialon: la nuancaĵoj de l' tekstoj, kaj ĝiaj entekstaj subsencoj!, tiuj ĉi ja estas preskaŭ netradukeblaj! Kaj provi traduki ilin estas reala defio.

Feliĉe, Machado trovis tradukintojn je sia staturo, ĉar tiu grava defio ja estis tute trapasita de Francisco Wechsler kaj Paulo Sergio Viana. Tiu kuraĝa duopo selektis kaj esperantigis naŭ el liaj plej famaj rakontoj, vere elkaptante iliajn realajn kaj plej literaturvalorajn trajtojn. Mi devas do demandi kial nur tiuj naŭ? (Fakte aliaj bonegaj rakontoj de Machado, kiel ekzemple *Teoria do Medalhão*, surprizas nin pro sia malĉeesto.)

Sed kio aldone direndas pri tiaj tradukintoj? Ĉu sufiĉus rimarkigi ke Wechsler, redaktisto de Brazila Esperantisto, kaj Viana - malnova amiko de Machado, ĉar li jam tradukis lian "*Alieniston*" - estas hodiaŭ inter la plej ĝisostaj konantoj de nia lingvo en nia lando?

Finfine, amiko, se vi estis, kiel mi, devigita legi Machadon dum la lernjaroj, nun (re)malkovru lin en lia esperanta versio, sendube vi tre plezurige surpriziĝos! ★

Machado de Assis
*La sekreta kaŭzo
kaj aliaj rakontoj*

Tradukis:
Francisco Stefano Wechsler
Paulo Sergio Viana

Wechsler Editora de Livros Ltda.

**La Sekreta kaŭzo kaj
aliaj rakontoj**

Aŭtoro: Machado de Assis
Trad.: Paulo Sergio Viana kaj
Francisco Wechsler

Urbocentro de Rio
en la XIX jarcento.

Radaro

Orientaj Eŭropaĵoj

Eldonejo Grafo-
kom, el Kroatujo,
publikigis du no-
vajn librojn en
Esperanto. La
unua estas *Padma,
la eta dancistino*,
verkita de Tibor
Sekelj. La alia es-
tas *Cigna kanto*, de
Josip Pleadin. Tiu
verko, laŭlonge de
68 paĝoj, prezen-
tas originalajn
esperantlingvajn
poemojn verkitajn
de 2008 ĝis 2012.



Nova eldono de muzika libro

La Eldona Fakoj de EASP relanĉis la libron *Muzika Terminaro*, verkita de la kolombia muzikestro Alfredo Aragón. La verko, publikigita proprapoŝe de ties aŭtoro en la jaro 2011-a, havis konsiderindan akcepton, malgraŭ la malgranda eltirajo.

La nova eldono estis reviziita kaj pligrandigita. Kunlaboris kun Aragón la hungara esperantisto Jozefo Hovard.

Ĝi estis lanĉita dum la 49-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta fine de Januaro en Florianópolis.

Por amuzi ne nur infanojn

Fine de Januaro la eldonejo Impe-
to, el Rusujo,
publikigis sian
unuan Esperant-
lingvan titolon en
tiu ĉi jaro. Temas
pri *Miraklo de
unu momento*, el la
serio *Fabelaj Sekretoj*.
Ĝin verkis Anna Striga-
nova. Laŭlonge de 48
paĝoj, tiu libro pre-
zentas 22 rakontojn,
ilustritajn per fotoj
de pupoj, kiujn kreis
la aŭtorino mem.



Romano pri memperdo kaj memtrovo

Eldonejo Mondial, el Usono,
publikigis la libron *Marina*,
verkita de Sten Johansson.
Temas pri moderna romano,
pri memperdo kaj memtrovo.

Laŭ la retejo de Mondial, la
aŭtoro – konsiderata
unu el la plej fekundaj
esperantistaj verkistoj
kaj tradukistoj – elpen-
sis modernan romanon.
Ĝi elstaras pro sia “riĉa
mozaiko de tridimensiaj
rolantoj”. La teksto fluas
ne ĉiam kronologie, sed
efikas “filmece kaj kate-
nas la atenton”.

Instruoj de Zamenhof

La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu esperantisto *aparta*, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la esperantaj *kongresoj*, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alktutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton.

*L.L. Zamenhof
Parolado efektivigita dum la 8a UK
Krakovo (Pollando), 1912.*



2-a Esperanta Librofoiro de Niterói

De la 12-a ĝis la 17-a de Aprilo
Loko: Placo Araribóia
(ĉe la ŝipstacio)

Teatraj kaj muzikaj
prezentadoj



Organizado:
NITEK - Niterói Esperanto-Klubo

Subteno:
AERJ - Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro
KKE - Kultura Kooperativo de Esperantistoj
Eldonejo Lorenz

La plej aŭskultata Esperanta radio-programo en la tuta mondo

Ne nur telefonalvokoj,
leteroj kaj retmesaĝoj
atestas nian sukceson.
La kvanto de niaj
aŭskultantoj estas
mezurata ĉiutrimonate
de IBOPE, la plej
grava opinio-esplora
institucio de Brazilo.
Averaĝe ni situas inter
la kvar plej aŭdataj
radio-programoj de la
metropola regiono de
Rio-de-Janeiro.
Esperanto dankas.



Programo

Esperanto, la Lingvo de Frateco

Marde: 15h00

Vendrede: 23h00

Radio Rio de Janeiro AM 1400 kHz

www.radioriodejaneiro.am.br

linguadafraternidade@bol.com.br

